

Emanuel Geibel,  
Der Mai ist gekommen

1. Der Mai ist gekommen,  
Die Bäume schlagen aus,  
Da bleibe, wer Lust hat,  
Mit Sorgen zu Haus!  
Wie die Wolken dort wandern  
Am himmlischen Zelt,  
So steht auch mir der Sinn  
In die weite, weite Welt.

2. Herr Vater, Frau Mutter,  
Daß Gott euch behüt!  
Wer weiß, wo in der Ferne  
Mein Glück mir noch blüht;  
Es gibt so manche Straße,  
Da nimmer ich marschiert,  
Es gibt so manchen Wein,  
Den ich nimmer noch probiert.

3. Frisch auf drum, frisch auf drum  
Im hellen Sonnenstrahl!  
Wohl über die Berge,  
Wohl durch das tiefe Tal!  
Die Quellen erklingen,  
Die Bäume rauschen all;  
Mein Herz ist wie 'ne Lerche  
Und stimmt ein mit Schall.

...

Emanuel Geibel,  
Nun Majo alvenis

*tradukita de Ferdinand Pfeil*

1. Nun Majo alvenis,  
Burĝonas la arbar',  
La nuboj formigras  
Tra landoj kaj mar',  
Aŭdiĝas en valoj  
Ĝojega birdkantad',  
Sopiras mi la mondon  
Travagi en migrad'.

2. Ho patro kaj panjo!  
Foriras mi kun Di',  
Fremdlandan feliĉon  
Serĉados nun mi;  
Ne paŝis mi ĉiujn  
Vojetojn en la rond',  
Ne trinkis mi ĉiun  
Bonvinon en la mond'.

3. Antaŭen, antaŭen,  
En bela sunbril'!  
El domo jam logas  
Alaŭdo per tril',  
La fontoj murmuradas,  
Zumadas la aer',  
Ekĝojas mia koro  
En ĉarma la veter'.

...

Emanuel Geibel,  
Migrado

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Nun Majo alvenis,  
Burĝonas la arbar',  
Do restu en hejmo,  
Filistra homar'!  
La nuboj ĉe ĉielo  
Migradas jam for,  
Laŭ ili nun fortiras  
Min la migrama kor'.

2. Nu, patro, patrino,  
Adiaŭ nun al vi,  
Feliĉon ekstere  
Serĉadas nun mi,  
Ja, multe da vojoj  
Ne vidis mi jam  
Kaj multe da bonvino  
Nur konas mi laŭ fam'.

3. Antaŭen, antaŭen  
Dum hela sunradi',  
Trans montoj, trans valoj  
Kun vigla energi'!  
La fontoj murmuradas,  
Bruigas arbojn vent',  
La koro kun alaŭdo  
Kunkantas pro kontent'.

...

4. Und abends im Städtlein,  
Da kehr ich durstig ein:  
"Herr Wirt, mein Herr Wirt,  
Eine Kanne blanken Wein!  
Ergreife die Fiedel,  
Du lustger Spielmann du,  
Von meinem Schatz das Liedel,  
Das sing ich dazu!"

5. Und find ich keine Herberg,  
So liege ich zur Nacht  
Wohl unter blauem Himmel,  
Die Sterne halten Wacht;  
Im Winde die Linde,  
Die rauscht mich ein gemach,  
Es küsset in der Frühe  
Das Morgenrot mich wach.

6. O Wandern, o Wandern,  
Du freie Burschenlust!  
Da wehet Gottes Odem  
So frisch in die Brust;  
Da singet und jauchzet  
Das Herz zum Himmelszelt:  
Wie bist du doch so schön,  
O du weite, weite Welt!

...

4. En urbo vespere  
Gajigu min regal',  
Ekbrilu bonvino  
En klara pokal':  
Ekprenu gitaron,  
Gajega muzikant'!  
Pri mia dolĉulino  
Eksonu bela kant'!

5. Se foje mi dormos  
Sen lito sub mantel',  
La steloj min gardos  
Sub blua ĉiel',  
Per dolĉa murmuro  
Lulados min tili',  
Min vekos frumatene  
Unua sunradi'.

6. Migrado, migrado,  
libera vivoĝoj'!  
Ĉar Dia spirado  
Min tuŝas en voj',  
La koro ĝojegas  
De l' mont' al mara ond'  
Vi estas belega,  
Vi vasta, vasta mond'.

...

4. Vespere en urbeto  
Gastigos min trinkej':  
"Ho, mastro, nur vinon,  
Sed de bongusta plej!"  
"Ekprenu gitaron,  
Gajega muzikant'!"  
"Prikantos mi knabinon,  
De kiu mi amant'."

5. Se mankos restejo  
Kun noktripoz' kaj vin',  
Sub ĉielo mi kuŝos,<sup>3</sup>  
La steloj gardos min,  
Bruanta tilio  
Lulados al dormad',  
La matenruĝo vekos<sup>4</sup>  
Denove al migrad'!

6. Migrado, migrado  
Libera ĝojo vi,  
En brust' freŝe blovas  
La spiro de Di',  
La koro ĝojegas  
Por la ĉirkaŭa rond',  
Ke vi do estas bela,  
Ho, vasta, vasta mond'!

...

<sup>3</sup>Rimarkigo de Manfred Retzlaff: En la "Esperantista Kantaro", el kiu mi la tekston detajpis. la linio tekstis: Sub ĉielo min kuŝos. Sed tio verŝajne estas pres-eraro.

<sup>4</sup>Ŝanĝpropono de Manfred Retzlaff: La matenruĝ' min vekos

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Emanuel Geibel, publikigita 1841.*

*Arg-235-464 (2010-05-01 22:42:36)*

*Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Emanuel\\_Geibel](http://de.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel) kaj la Esperantan version [http://eo.wikipedia.org/wiki/Emanuel\\_Geibel](http://eo.wikipedia.org/wiki/Emanuel_Geibel).*

*Traduko de la Germana poemo “Der Mai ist gekommen” de Emanuel Geibel en Esperanton de Ferdinand Pfeil.*

*Arg-235-465 (2004-04-27 10:37:11)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto “La verdaj paseroj kantas”, eldonita de la Esperanto-Grupo Espero, Berlino, en 1948.*

*Traduko de la Germana poemo “Der Mai ist gekommen” de Emanuel Geibel en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919).*

*Arg-235-466 (2006-05-07 20:51:04)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la libro “Esperantista Kantaro”, Kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann, Berlin W. 35, Steglitzer Str. 44.*